

Raporto pri la seminario en Rumonge

De la 1-a gxis la 7-a de Septembro 2013 okazis instruseminario de Esperanto en Rumonge, Burundo. Kiel kutime, la celo de la seminario estis havigi instruiston kapablan al cxiu mezgrada lernejo, kie jam estas aux estos esperantoklubo.

Gxin partoprenis esperantistoj el Bubanza, Bujumbura, Ngozi, Kayanza, Muramvya, Makamba, Rutana, Mwaro, Cibitoke, Gitega kaj Bururi.

Estis antaux vidita partopreno de 60 personoj (50 lernontoj kaj 10 instruistoj) sed pro helpo de Portilo el Venezuela kaj Ronald amiko de USONO..... Ni sukcesis aldoni 3 burundajn esperantistojn kaj du esksterlandanoj: Kongiano, Jeremie Kapuni kaj Kenjanino Sharifa Abas. Entute cxeestis la seminario 63 personoj el tri landoj Burundo, Kenjo kaj RD Kongo.

La seminario okazis cxe liceo de Rumonge, cxuij restis en la seminariejo gxis la fino, do estis okazo por seminarianoj lerni kune nokte.

Dimancxon, la 1-an de Septembro, seminarianoj ekalvenis je la seminariejo posttagmeze. Hasano, Jérémie kaj Pamphile estis cxeloke por atendi ilin kaj registri ilin.

Poste registriĝo, organizintoj tuj montris al ili kie ili dormos por ke ili metu siajn bagagxojn.

Je la 18-a, preskaux cxuij jam alvenis kaj seminarianoj enris klascxambron, kie okazadis la instruado.

Poste la Espero, la Prezidanto de ANEB, S-ro Jérémie SABIYUMVA bonvenigis la seminarianojn tutdezirante por ili bonegan restadon en Rumonge, loko kie varmas. Li profitis la okazon por doni al ili konsilojn por ke ili sukcesu en la fina ekzameno. Li oficiale malfermis la seminarion kaj sekvis interkonan vesperon.

En la interkona vespero, cxiu devis prezenti sian kunsidinton kaj tio permesis al organizantoj vidi parolkapablon de seminarianoj. Cxar partoprenintoj estis lacaj, je la 19h30 ni vespermangxis kaj poste dormis.

Lundon, poste matenmangho, ni eniris la klaschambron por la unua leciono. Por testi konon de partoprenintoj, okazis antauxtesto : temis pri verkado de unu pagxo, kaj cxiu kandidato devis skribi sian biografion.

Ekde lundo gxis Jxaudio, okazis diversaj kursoj pri gramatikajxo (internacia kurso : kurso trovigxanta je la franca retpagxo www.ikurso.esperanto-jeunes.org), Historio de Esperanto gxenerale, Historio de Esperanto en Afriko kaj Historio de Esperanto en Burundo.

Partoprenintoj havis okazon sekvi kursojn pri bona organizado de kluboj kaj Landaj Asocioj.

Kursoj pri kulturo de Esperanto ankaux estis sur menuo.

Instruistoj estis :

- S-ro SABIYUMVA Jrémie (Diplomo de ILEI/UEA, KER diplomo kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- S-ro NTAHONSIGAYE Hasano (Meza diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- S-ro NIYUKURI Gilbert (meza diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- S-ro NTAKIRUTIMANA Justin (meza diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- S-ro Eric (Meza diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- S-ro Innocent NSABIMANA (Meza diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- Etienne HARERIMANA (Elementa diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- Twalibu BIKIRANTANGANWA (Elementa diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- BAHATI Pamphile (Elementa diplomo ILEI/UEA kaj Diplomo pri instrukapablo de ANEB)
- NTAKARUTIMANA Nicodème (Diplomo pri instrukapablo de ANEB)

Vendredon, okazis ekzameno kaj gxin trapasis 48 kursanoj : kelkaj estis malsanaj. Estis entute 6 partoj :

- Skriba parto,
- Lega kompreno,
- Auxskulta kompreno,
- Kultura kono,
- Gramatika testo
- kaj parola parto.

Sabaton, atendente la rezulton de la ekzameno, seminarianoj refaris la taskon pri verkado de biografio. Ni redonis la unuajn paperojn al ili por ke ili rekorektu erarojn.

Posttagmezon, okazis ekskurso kie seminarianoj konatigxis kun la lago Tanganjika kaj diversaj lokoj de Rumonge.

Je la 17h00, la seminarianoj alvenis je la Esperanto-Centro kun biblioteko kaj tie okazis oficiala malfermo de la centro. Tie, auxdigxi diversaj kantoj, la estraro de ANEB, montris al partoprenintoj cxiujn chambrojn de la Centro. Estis invititaj eksurbestro, Jxurnalisto de la loka gazeto « Hodi Tanganjika », Estro de Kajenkoko kvartalo, kie trovigxas la centro, Konsilanto de la nuna urbestro, Prezidanto de « KAZE FDD » (politika partio) en Bururi, instruistoj en mezgradaj lernejoj en Rumonge kaj najbaranoj.

Vesperon, poste vespermangxo, seminarianoj soife atendadis surprizon, cxar neniu jam estis informita pri la rezulto de la ekzameno.

Je la 22h00 ni ekdisdonis diplomojn al sukcesintoj : 33 ricevis diplomojn kaj aliaj 15 kandidatoj ricevis por komencantaj diplomojn. Cxiu diplomito ricevis 71 pagxan libron, « KURSO DE ESPERANTO » , kiu helpas al ili ekinstrui. La Prezidanto de ANEB promesis sendi pliajn librojn al kandidatoj, kiuj starigos novan klubon.

Li aldonis ke cxiu kandidato devas plibonigi sian lingvokapablon legante la libron, kiun organizantoj preparis por ili. Partoprenintoj el Ngozi petis organizi seminarion en cxi tiu provinco, kaj ecx inviti internacian arangxon. La prezidanto de ANEB respondis ke cxio dependos de ilia volo, se ili kontentige laboros, nenio malhelpas organizi arangxon en Ngozi.

Je la noktomezo, la Prezidanto de ANEB oficiale fermis la seminarion dezirinte al seminarianoj bonegan vojaĝxon kaj fruktodonajn diplomojn.

Poste disdono de diplomoj estis tempo muzikumi, drinki kaj trinki gxis matene.

Dimanĉxon, poste matenmangxo, ni disdonis busbiletojn al partoprenintoj, kaj je la 8h00, ili ekforiris.

Niaj Dankoj iru al la fondajxo Hans kaj SAT-amikaro, kiuj subvenciis la seminarion. Ni ankaux dankas al Portillo el Venezuela kaj Ronald el Usono kies kontribuo helpis restadon kaj bileton de Kongia kaj Kenja esperantistoj.

Fine, niaj dankoj al chiu esperantistoj, kiuj sendis al ANEB salutmesaghojn al la seminarianoj kaj gratulmesaghojn pri la malfermo de la Esperanto-Centro kun Biblioteko.

Ni ankaux dankas al SAT-Amikaro pro la revuoj.

Jérémie SABIYUMVA